



# Boletín

Nº 370 marzo / abril 2005




**64º HISPANA  
ESPERANTO-KONGRESO**

De la 7ª a la 10ª de julio de 2005  
**ALCALÁ DE HENARES**  
Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca  
Plaza de San Julián, 1

**DONKIĤOTO PAROLAS ESPERANTON**

Asociación de utilidad pública



# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO  
Aperanta de 1949

Redaktisto: Miguel Gutiérrez Adúriz;  
Los Coterros 1-C, 2-I; ES-39600  
Muriedas; Cantabria;  
bulteno@esperanto-es.net

*Noto: Pri la enhavo de la artikoloj  
respondecas nur la respektivaj aŭtoroj.*

*La redaktisto rajtas libere rifuzi ne  
petitajn artikolojn.*

## Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;  
ES-28015 Madrid;  
Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79  
Konto ĉe BBVA :  
0182-1252-31-0204011961  
admin@esperanto-es.net  
www.esperanto-es.net

## Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho.  
Vicprezidanto: José M. Galofré.  
Sekretario: Manuel Parra.  
Kasisto: Pedro Garrote.  
Vicsekretario: Marcos Cruz.  
Voĉdonantoj: Luis Hernández,  
Augusto Casquero  
Miguel Gutiérrez.

## Enhavo

Donkiĥoto, Expolingua kaj HEF (Ana Manero) . . . . .	2
Pri Grupoj, Asocioj kaj tiel plu. . . . .	6
Hispana sekcio de ILEI (A. C.) . . . . .	12
Fundación Esperanto . . . . .	12
Lerneja interŝanĝo (AKEL-teamo) . . . . .	13
Fruktodona kunlaboro (S.D.) . . . . .	14
Diskoj pli facile akireblaj . . . . .	14
La Ateneo de Madrid kaj Esperanto (Manuel Pancorbo Castro) . . . . .	15
Donkiĥoto kaj la infanoj de la mondo (Ana Manero) . . . . .	16
Laŭtlegado de Donkiĥoto ankaŭ en Esperanto (TdB) . . . . .	17
Buse al UK (Aŭgusto Casquero) . . . . .	18
Emas korespondi. . . . .	18
Dumkongresa omaĝo al Fernando de Diego (Ana Manero) . . . . .	21
Ĉirkaŭ la mondo . . . . .	22
Dumkongresa loĝado (Dario R.) . . . . .	24
La lumpiramido (Vinilkosmo) . . . . .	24
Jarabonoj kaj kotizoj por 2005 . . . . .	27
Kultura E-Festivalo denove en Finnlando (Riitta Hämäläinen) . . . . .	26
Aniĝilo por 2005. . . . .	28
64a Hispana Esperanto-Kongreso Nova Provizora Programo . . . . .	29
Aliĝilo . . . . .	32
Diplomo. Geedziĝo . . . . .	k-d

# Donkiĥoto, Expolingua kaj HEF



Jam de pluraj jaroj la esperanto-stando plaĉe spicas la lingvofoiron,

De la 8a ĝis la 10a de aprilo, en la foirejo de Casa de Campo de Madrid, Hispana Esperanto-Federacio denove partoprenis —jam la sepan fojon— la internacian foiron pri lingvoj Expolingua. Kaj denove esperanto havis la ŝancon montriĝi al multnombra publiko ene de mallonga tempospaco.

Kiel sciate, pro manko de financaj kaj foje ankaŭ homaj rimedoj, HEF decidis jam en 2002, meti limon al sia partopreno en la lingvo-foiro, kaj ĉeesti nur ĉiun duan jaron. Nu, tio simple ne eblis. Jam plurfoje, kiam ni anoncis nian malfacilon munti budon dum la foiro, la organizantoj de Expolingua serĉis la manieron



Jen nia prezento por miloj da homoj. Ĉi-jare, nia stando situis en “angulo” de la lingvofoiro.

subvencii nian partoprenon: jen oni disponigas malgrandan pli etkostan budon, jen pagigas al ni nur parton de la elspezoj, jen —kiel ĉi-jare— oni proponas kompromisan solvon: interkonsentitan rabaton de la prezo kontraŭ enmeto en la HEF-paĝaron de ligo al ties retejo.

Ankoraŭfoje do, HEF decidis profiti la ŝancon, ke ŝajne nia lingvo plaĉas al la organizantoj de Expolingua. Probable ĉar la esperanto-budo ja buntigas la foiron kaj alportas iom da freŝo, iom da —ĉu diri tiel?— ĉarma, eble naiva, aŭ eĉ kiĥoteska teniĝo antaŭ la lingvo-problemo kaj ties faktaj solvoj.



Unua tago, malfermiĝis la pordo kaj...  
kio okazos?

Sed, nu, ĉijare en Hispanio oni festas la 4an Centjariĝon de la unua eldono de la plej konata verko de Cervantes, “La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha”. Kaj HEF lanĉis kampanjon por kunfesti la celebradon... Esperantistoj do plu kiĥotu kun Donkiĥote ankaŭ kadre de Expolingua. Tiamaniere, tiu verko, majstre tradukita de Fernando De Diego nialingven, iĝis la preteksto de nia ĉijara partopreno. Vi povas pli detale legi prie en <[www.esperanto-es.net/quijote](http://www.esperanto-es.net/quijote)>.

Kompreneble, ni profitis por jam anonci la Hispanan Kongreson en Alcalá de Henares, kies ĉefa temo estos —vi divenas, ĉu?— “Donkiĥoto parolas esperanton” <[www.esperanto-es.net/congreso2005](http://www.esperanto-es.net/congreso2005)>.

Tial ke, malgraŭ ĉio, niaj rimedoj plu malgrandas, plu nepriis partopreno modesta kaj senpompa, tamen inda, respondeca kaj aktiva. La celoj al kiuj HEF strebis jam la unuan fojon, restas plene aktualaj: montri decan bildon de la asocio HEF-Bulteno n-ro 370




Esperanto daŭre vekas la intereson de la publiko, kiu jen unuafoje sciigās pri la lingvo, jen konstatas ke nia kulturo bonstatas.

Ĉio, veki pozitivan sintenon rilate al esperanto kaj ampleksigi la konon de la ĝenerala publiko pri la lingvo. Kaj jen la sekvoj de sepjara sperto: modernigo de la informsystemo de la asocio kaj ĉefe pligrandigo de nia memkapablo por respondece labori teame.

Kiel kutime ni aparte zorgis doni taŭgan bildon kaj per la montrataj materialoj kaj per la antaŭpublika agado. HEF provas ĉiam sinprezenti kiel moderna kaj plene organizita asocio tute kongrua kun la nuntempo.

Krom la kutimaj informiloj (“Unua kontakto”, “Iom da gramatiko”, “Pasporta Servo”, “Esperanto en Internet”, “Perkoresponda kurso”...), ĉijare prezentiĝis la flugfolio “Donkiĥoto parolas esperanton”, kun pluraj dulingvaj citaĵoj el la verko. Jen probable la plej simpatia, tiu, kiu penikis pli da ridetoj sur skeptikaj vizaĝoj:



Informi klopodante ne tedi la homojn, kiuj alproksimiĝas al la budo foje nekredemaj, foje scivolaj.

“...li alparolis min en la lingvo (...) nek kastilia, nek maŭra, nek apartenanta al ajna nacio, sed mikso de ĉiuj lingvoj kaj per ĝi oni interkompreniĝas”

(CERVANTES, Miguel de. “La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha” Unua parto. Kapitro XLI.)

Kiel kutime ni muntis ekspozicion de signifoplenaj libroj kaj allogaj diskoj. Estas vere amuze vidi la spontanegan gapadon de homoj antaŭ tradukoj de konataj aŭtoroj. Ankaŭ en komputilo ni disponis tre interesan materialon. Unue, videon surbaze de tre favora televida raporto farita antaŭ kelkaj monatoj de la televid-ĉeno Localia okaze de la prezentado de la filmo “La pedalaŭto”. (Ne forgesu, ke ties ĉefrolanto paroletas esperanton, kaj ke ĝia subtitolita versio en esperanto estos prezentita dum la kongreso en Alcalá de Henares!). Due, komputilan prezenton per sinsekvaj bildoj, de la diversaj aspektoj de la esperanta kulturo. Ankaŭ ni povis aŭskultigi muzikon (Kiu diris, ke ne eblas rokumi en esperanto?)

kaj montri ekzemplerojn de virtuala biblioteko (e-librejo.nu). Eĉ Mazi aperadis de tempo al tempo por saluti la spektantojn kun ĉarmo de simpatia grandegulo.

Kiam eble, HEF profitas la ŝancon kontribui al la paralelaj aktivajoj prezentataj en Expolingua. Ĉifoje temis pri du: prezentado de la Projekto Kifoto 2005 <[www.esperanto-es.net/quijote](http://www.esperanto-es.net/quijote)> far José Antonio del Barrio, kaj enkonduko en esperanton (ĉefaj trajtoj de la lingvo por ĵusaj interesiĝintoj) far Alejandro Pareja. Ne tiom gravas la nombro de ĉeestantoj, nepre malgranda ĉar la destinita spaco ankaŭ tielas, kiom la fakto ke la aktivajojn oni ĉie disanoncas: retejo de Expolingua <[www.expolingua.es](http://www.expolingua.es)>, priaj broŝuroj, surloke per laŭtparoliloj... Tamen, ĉifoje ankaŭ ni povas gratuli nin —fakte la prelegintojn!— pri sukcesaj prezentadoj, ĉar la eta loko pleniĝis, kaj estiĝis sufiĉe da interesaj demandoj.

Kaj kvankam nia ĉefa celo ne estis vendado, ni disponis kiel kutime, lernolibrojn, vortarojn (eĉ PIV-on kaj la Gran-



Pacienco, multe da pacienco por klare informi evitante tipajn troigojn.

dan Vortaron Hispana-Esperanton... kaj ambaŭ vendiĝis), Kiĥotojn, Asteriksojn, K-diskojn kaj alispesan materialon. Per ili ni enspezis la rekordon de preskaŭ 500 eŭrojn!


Antaŭ la foiro nia prezidanto sendis personan leteron kun invitilo al pluraj gravuloj kaj ĵurnalistoj kiuj iam interesiĝis pri la lingvo aŭ iel havis rilaton al HEF. Inter ili, ni menciis la sekretario de la Hispana Komitato pri Kunlaboro kun UNESKO.

Dum la foiro pluraj ĵurnalistoj interesiĝis kaj niaj deĵorantoj estis kelkfoje intervjuitaj. Aparte menciendas, ke Ernesto Armendáriz, de la televid-ĉeno Antena 3, vizitis duan fojon la budon nur por intervjui la direktoron de Fundación Esperanto, José Antonio del Barrio. Ankaŭ Telemadrid kaj Onda Seis faris respektivajn raportojn, sed bedaŭrinde nur tiu de la lasta elsendiĝis.

Kaj jen la ĉijara anekdoto: hazarde vizitis la budon pranepino de Vicente HEF-Bulteno n-ro 370



Ne propagando sed fidinda informado.




Jen fenestro al la esperanta kulturo: la ekranon de la komputilo.

Inglada, unu el niaj priferindaj pioniroj, pri kiu eblas detale legi en Boletín n-ro 364 en tre interesa artikolo de A. Marco Botella. Nu, ŝi promesis iam sekvi la spurojn de la praavo kaj eklerni la lingvon.

Resume do, denove pozitiva sperto, malgraŭ ĉiaspecaj malfacilaĵoj, kiuj solviĝis ĉiam danke al la sindediĉo de ĉiuj kunlaborantoj, kiujn mi volas kiel kunordiganto kore danki per ĉi linioj.

Ana Manero



# Pri Grupoj, Asocioj kaj tiel plu.

## Andaluzio

La 7an de marto okazis en la Kordova Urbodomo la prezento de la libro "Francisco Azorín Izquierdo. Arquitectura, Urbanismo y Política en Córdoba (1914-1936)", eldonita de la Universitato de Kordovo. La libro enhavas la prelegojn prononcitajn en la jaro 1991 dum stud-semajno dediĉita al Francisco Azorín kaj kunlaboraĵo pri la esperanto-agado de Azorín, kies aŭtoro mi estas. Entute aperas 13 kunlaboraĵoj, tiu de mi verkita titoliĝas "Aproximación a la figura y a la obra de Francisco Azorín Izquierdo como esperantista". En ĝi, mi parolas komence pri kio estas kaj kiel naskiĝis esperanto; kiam la lingvo eka-peras en la urbo Kordovo; mi studas la agadon de Francisco Azorín unue kiel esperantiston kaj poste kiel esperantisto-socialiston. Kaj fine mi studas la 4 librojn publikitajn de Azorín en Esperanto.

Dum la prezento de la libro, la parolantoj, apartenantaj al la Universitato de Kordovo, elstarigis la esperantistecon de Francisco Azorín. Ĉestis, krom urbo-

domaj aŭtoritatuloj kaj reprezentantoj de la Universitato, du genepoj de Francisco Azorín. Mi pensas, ke la ekzisto de la libro pruvas la taŭgecon de Esperanto.

Ha, mi ne volas forgesi, ke unu el la prezentantoj de la verko demandis al mi dum la akto, ĉu eblas traduki la tutan libron en esperanton? Jes, kompreneble, mi respondis tuj.

*José María Rodríguez*

\* Diario SUR menciis en artikolo aperinta en marto la tradukon de Donkiĥoto en Esperanto.

\* Andalucia 24 horas mencias Esperanton parolante pri la aranĝo "400 aniversario del Quijote" (400a datreveno de Donkiĥoto), organizita de kultura fondaĵo de la magistrato de Sanlúcar de Barrameda.

\* En Diario de Cádiz aperis informo pri la ĵus eldonita historia libro "El verano que trajo un largo invierno" (La somero kiu naskis logan vintron) de Alicia Domínguez Pérez. En ĝi aperas fotoj de la kadiza E-grupo en 1923.

*M. Zocato*





Lernantoj de la mezlernejo Cuatro Caminos de Don Benito en Berlino.

## Ekstremaduro

\* En marto Pola Radio disendis leteron de José María Salguero pri lia alveno en Pollandon, en aprilo, kune kun siaj lernantoj kaj tiuj de la portugala lernejo gvidataj de Luis Ladeira.

*Darío Rodríguez*

\* En aprilo José M. Salguero vojaĝis kun siaj lernantoj al Pollando (vidu la artikolon "Lerneja interŝanĝo").

## Eŭskio / Vaskio

\* La 14an de marto komenciĝis la 5a E-kurso ĉe la Vaska Universitato. Aliĝis 15 gelemantoj. Ĝi estas libervole elektbla studobjekto kun valoro de 4,5 kreditoj, t.e. 45 horoj. La kurson gvidas Jesús María García.

\* Finiĝis la elementa kurso en la sidejo de la Grupo de Bilbao, gvidata de Patxi de la Hoz. Kaj daŭras la ĉiuvendredaj kunvenoj.

HEF-Bulteno n-ro 370

\* En la Ĝenerala Kunsido oni nomumis novan estraron kies konsisto jenas: Prezidanto: José Luis Bringas Tellechea; Vicprezidanto: Teodoro Ibáñez Martín; Sekretario: Sabin Orueta Mendia; Kasistino: Iciar Arteche Urrutia; Voĉdonantoj: Patxi de la Hoz Méndez (retejo kaj komputiko), Iñaki Vélez Ortiz (biblioteko kaj libroservo), Jesús María García Iturrioz (Nia Ponto).

*Nia Ponto n-ro 59*

## Galegio

\* Grupo de junuloj montris en Interreto sian emon krei la Galegan Esperantan Asocion. Tuj oni reagis indikante ke tiu ekzistis antaŭ pluraj jaroj, kaj, verŝajne, ĝi plu ekzistas sed...

Niaj "malnovaj" asocioj do daŭre taŭgas, sed ili tute ne povas ne priatenti Interreton, kie nuntempe aperas multaj junaj apogantoj de Esperanto.

*Miguel Gutiérrez*

\* Unu el la aŭtoroj de la libro "O anarkiismo na Galiza" (La anarkiismo en Galegio), en kiu aperas artikolo pri Esperanto, petis informojn al HEF pri la tiea movado.

*Antonio del Barrio*

## Kanariaj Insuloj

La magistrato de San Sebastián de La Gomera, kunlabore kun ESTO, okazigis en la Librotago prezentadon de libroj en Esperanto, prelegon pri la Internacia

Lingvo kaj plurnacian interretan babiladon. La informado pri la aranĝoj aperis en diversaj komunikiloj, inkluzive de Interreto.

## Kantabrio

\* La 20an de aprilo Miguel Gutiérrez legis plurajn poemojn el la verko Donkiĥoto en la hispana kaj en Esperanto, ene de kultura aranĝo pri la verko de Cervantes, organizita de ONCE en sia sidejo de Santander. La prezento pozitive impresis la ĉeestantojn.

\* Membroj de KantEA ekskursis en marto al la fraca urbo de Biaritz kaj, en aprilo, oni faris rondvojaĝon por viziti diversajn dig-lagojn de Palencia, León kaj Asturias.

*M. Zocato*

## Kastilio-Leono

\* La 28an de Aprilo, kadre de Kulturaj Tagoj aranĝitaj de la gestudentoj de la Fakultato pri Filozofio kaj Beletro de la Universitato de Valladolid en Salono Lope de Rueda kaj sub la ĝenerala temo “Esperanto, vehiklo de internacia kulturo” prelegis pri “Planitaj Lingvoj” Rodrigo Portela, ĉeforganizanto de la esperanta parto de la evento; pri “Zamenhof kaj ĝia kreaĵo” parolis Pedro Garrrote, kaj pri “Lingvaj Problemoj en



KantEA-anoj kutime ekskursas unu fojon monate, ĉi-foje oni vizitis plurajn dig-lagojn.



Legado de Donkiĥoto en aranĝo organizita de ONCE.

la Internaciaj Rilatoj” prelegis d-rino Rafaela Urueña.

La evento, kune kun la aliaj okazintaj kadre de tiuj kulturaj tagoj estis amplekse anoncita pere de afiŝoj videblaj en ĉiu angulo de la Fakultato.

Kurioze, unu el la aŭskultintoj montris ĉe la ekrano de sia

poŝtelefono jenan vortludon, kiun li kopiis el paĝo de la revuo Esperanto, kaj scivole petis tradukon:

—Kaj kiel vi bankrotis, sinjoro komercisto?

—Mi edziĝis kaj komencis investi en in-vestojn.

Kiel traduki? Cetere, neniu demandis “kiom da homoj parolas Esperanton?”.

*Luis Hernández kaj aliaj*

\* La ĵurnalo Diario de Burgos de (05.03.30) aperigis kurtan sed trafan leteron de Pedro Hernández, kiu reagis al artikolo de Luis Ángel de la Viuda titolita “Confusión de lenguas” (Lingvo-konfuzo).

*Ignacio Gómez*

## Kastilio-Manĉo

\* Alejandro Pareja transdonis ekzempleron de Gran Diccionario Español-Esperanto al la Publika Biblioteko de Cuenca la 14an de aprilo.

*MZ*

## Katalunio

\* En la Ĝenerala Kunsido de KAE oni reelektis la Estraron kies konsisto jenas: Prezidanto: Josep María Galofré Domingo; Vicprezidanto: Santiago Torné Grau; Sekretario: Giordano Moya Escayola; Vicesekretario: Pere Miquel Puyol; Kasisto: Juan Blasco Bracons; Voĉdonantoj: Martí Guerrero i Cots, Salvador Aragay Galvany, Josefina Girona Ribé.

\* Radio Nesto elsendas la programon de la antaŭa skipo de Radio Bronka (Juanjo kaj Paco), kiu daŭre produktas HEF-Bulteno n-ro 370

1-horan programon, ĉefe en la hispana, kies enhavo sekvas la antaŭajn liniojn de Radio Bronka. Nova programo estis lanĉita kaj restas aŭdebla en Radio Nesto (dum 2-semajnoj) en jenaj horaroj:

Curso de Esperanto (Español) Ĉiudimanĉe: 04-06h GMT; 18-20h GMT

Radio Nesto

[www.monda.org/radionesto](http://www.monda.org/radionesto)

Projekto Nesto:

[www.monda.org/nesto](http://www.monda.org/nesto)

*Adonis Saliba*

\* Almenaŭ du e-istoj, Francisko Simonnet kiel sendito de “Liberio por la lingvoj”, kaj Vilhelmo Lutermano kiel reprezentanto de “Le Monde diplomatique” en Esperanto, partoprenos en la “neesperanta” MedSF (Mediterranea Socia Forumo), de la 16a ĝis la 19a de junio en Barcelono <[www.fsmed.info](http://www.fsmed.info)>. Tamen, oni esperas ioman kaj ielan partoprenon aŭ kunlaboron de katalunaj esperantistoj. Jen la temaro: 1) Demokratio, civitaneco kaj homaj rajtoj de viroj kaj inoj. 2) Konfliktoj, militaj okupoj, militismo kaj paco. 3) Ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj kaj modeloj de disvolviĝo. Laboro kaj konfliktoj. 4) Migradoj. 5) Kultura

---

## Hispana Esperanto-Federacio

[www.esperanto-es.net](http://www.esperanto-es.net)

[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

---

diverseco kaj transkulturaj dialogoj. 6) Modelo de disvolviĝo kaj media daŭropovo. 7) Ino kaj Mediteraneo.

### *SATeH*

\* Okazis la 46a Intenacia Fervojista Esperanta Skisemajno en La Molina. Aliĝis 42 skiistoj (partoprenis 32) el Hispanio, Francio, Danio, Germanio, Belgio, Rumanio kaj Hungario.

\* Martí Guerrero prelegis pasintan februaron en Casal Torre Balldobina (Santa Coloma) pri "La lingvistika problemo en Eŭropa Unio".

\* "El Periodico de Catalunya" (27a de aprilo) mencias esperanton rilate al Ate-nuo Llibertari de la Verneda.

### *KEA-bulteno*

\* La ekspono pri Donkiĥoto "Quixot, 400 anys de somnis" de la Centra Biblioteko de Terrassa prezentas al la publiko la E-tradukon eldonitan de Fundación Esperanto en 1977.

### *Gloria Soler*

\* Sub la aŭspicio de Barcelona Esperanto-Centro okazos ĉi-jare la 4aj Someraj Dialogoj Esperanto-Restadejo, la 10an kaj la 11an de septembro. Adreso: Camí del Pou 9; 08691 Monistrol de Montserrat; Barcelono. Informas: S. Aragay, Tel: 93.333.80.81 kaj 93.645.404.755

**Kontonumero de**

**HEF ĉe BBVA:**

**0182-1252-31-0204011961**

## **Madrido**

\* MEL prezentos la verkon "El hombre que desafió Babel", traduko el "L'homme qui a défié Babel" de René Centassi kaj Henri Masson, en la venonta kongreso okazonta en Alcalá. La prezo estos 20 eŭroj (plus sendokosto). Tamen MEL faras apartan proponon ĝis la kongreso: "El hombre que desafió Babel" kaj Nuevo método de Esperanto" kune kontraŭ la sama prezo. Profitu!

\* Dum pluraj tagoj oni povis aŭskulti en Interreto ([www.campusred.net](http://www.campusred.net)) kvar pecojn de El Quijote en esperanto, ĉerpitaĵn el la publika legado okazinta en Círculo de Bellas Artes de Madrid.

\* La Magistrato de Alcalá de Henares informas per siaj retejo pri la akiro de ekzemplero de Donkiĥoto en Esperanto.

## **Murcio**

\* Jesuo de las Heras daŭre pliriĉigas sian interesan Gazetotekon per pluraj numeroj de Popola Fronto, magazino eldonita dum la Hispana Intercivitana Milito inter 1936 kaj 1939 en Valencio. Cetere, li enretigis novan numeron de Kajeroj de la Sudo. Ĉio troveblas ĉe: <[www.gazetoteko.com](http://www.gazetoteko.com)>

## **Valencio**

\* La 17a Kongreso de Valencia E-Federacio kaj Murcia okazis en la bela apudmara urbo San Juan (Alicante), la

HEF-Bulteno n-ro 370



Feliĉaj vizaĝoj en la Valencia-Murcia Kongreso.

16an kaj 17an de aprilo. ĉeestis samideanoj el Alicante, Murcia, Valencio, Quart de Poblet, Callosa de Segura, kaj po unu el Ukrainio kaj Belgio.

Aparte interesaj programeroj estis la prelego de Martín Bustín pri “Historio de SAT”, kaj la Ĝenerala Asembleo, en kiu estis reelektita kiel Prezinto s-ano José Miguel Bernabeu Egea. Oni decidis okazigi la venontan kongreson en la provinco Castellón.

La ĉeestantoj tre ĝuis la projekciadon de du dvd-filmoj, produktitaj kaj kreitaj de Roman Dobrzynski, “La roko de la Libereco” kaj “Valencio en fajroj”.

\* La biblioteko de San Miguel de los Reyes eksponis ekzemplerojn de Donkiĥoto, inkluzive de la Esperanta eldono.

*La voz digital*

\* La Grupo Esperanto de Valencia havas jam novan komputilon, kion oni aprobis en la la lasta Ĝenerala Kunsido okazinta la 20an de aprilo.

HEF-Bulteno n-ro 370

\* Jam konsulteblas la e-libroj kaj materialo de la universitata biblioteko “Biblioteka de Humanidades” ĉe:

[http://trobes.uv.es/search\\*val/desperanto&Submit3=Cercar/desperanto/1%2C81%2C81%2CB/browse/indexsort=m](http://trobes.uv.es/search*val/desperanto&Submit3=Cercar/desperanto/1%2C81%2C81%2CB/browse/indexsort=m)

*Augusto Casquero*

## Ĝenerale

\* En la 11a paĝo de “Ciberpaís” (ekstraĵo de “El País”, 10.03.2005) aperas pozitiva informo pri Esperanto kun informo pri konsultebla retejo.

\* En la kultura ekstraĵo de la ĵurnalo ABC (5an de marto), Juan Pedro Quiñonero, ĵurnalisto kaj verkisto, mencias ke Julio Verne simpatiis esperanton en la artikolo “Julio Verne, burgués y subversivo” (Julio Verne, burĝulo kaj renversemulo).

*José María Rodríguez*

\* Danke ĉefe al la laboro de Guillem Portell eblas ekvidi la Esperanto-portalon de la verdaj EU-parlamentanoj ankaŭ en la kataluna:

<<http://ikso.net/verduloj>>.

*Darío Rodríguez*

\* En la dimanĉa ekstraĵo de El País (05-03-13) aperas intervjuo al George Soros, kaj oni mencias ke li kaj lia patro, Tividar, estis esperantistoj.

*Manuel Pancorbo*

## Hispana Sekcio de ILEI

Antaŭ iom da tempo ĉesis funkcii la hispana sekcio de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Nun kelkaj hispanaj e-istoj deziras funkciigi ĝin denove, ĉar apenaŭ kompreneblas ke Hispanio, en kiu okazas kursoj de Esperanto en diversaj universitatoj kaj lernejoj, ne havu tiun sektion.

Tial do, oni petas ĉiujn eventualejn interesitojn aliĝi kiel eble plej rapide por antaŭenigi tiun projekton.

La kotizo por Hispanio estas 18,00 eŭroj, se la membro deziras ricevi la revuon IPR papere kaj nur 4,00 eŭroj se la membro deziras ricevi la retan version de la revuo. La revuo aperas 4 fojojn jare.

Por starigo de Sekcio necesas almenaŭ 5 membroj (jam estas pluraj aliĝoj), el kiuj 1 fariĝos Sekciestro. La pagojn oni povas fari al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ rekte al la kasisto.

Pliajn informojn trovu ĉe:

<[www.ilei.info](http://www.ilei.info)>

Se vi havas intereson, sendu vian kotizon al tiu konto, kaj samtempe informon al Augusto Casquero, <[augustocasquero@hotmail.com](mailto:augustocasquero@hotmail.com)>

*Augusto Casquero*



## FUNDACIÓN ESPERANTO

Fundación Esperanto donacis al la Ŝtata Publika Biblioteko de Cuenca (Kvenko) "Fermín Caballero", ekzempleron de la Granda Vortaro Hispana-Esperanto, ene de la kampanjo por la donacado de Vortaroj al bibliotekoj de urboj kie neekzistas esperanta movado. La transdonon faris, la 14an de aprilo, la konata tradukisto, mem origina el Kvenko, Alejandro Pareja.

Cetere, la regiona programo "El Mirador" de la radiostacio de Cadena SER en Kastilio-La Manĉo, organizis la 22an de aprilo kvizon por siaj aŭskultantoj pri la verko "Donkiĥoto de La Mancha". Unu el la donacoj estis ekzemplero de la esperanta versio, kiun donacis Fundación Esperanto. Okaze de tio, oni mallonge intervjuis direktoron de Fundación, José Antonio

del Barrio, kiu informis pri tiu traduko kaj pri la lingvo ĝenerale.

*M. Zocato*

**Kontribuu al bona agado pere de:**

Iber-Caja

**2085-0101-13-0128624762**

La Caixa

**2100-2149-31-0100165085**

# Lerneja interŝanĝo

En multaj lernejoj, kaj eŭropaj kaj tutmondaj, oni uzas kaj instruas E-on laŭ tre diversaj manieroj. Dum la lastaj jaroj kelkaj eŭropaj lernejoj kontaktis por interŝanĝi siajn spertojn kaj, danke al permona apogo de la Europa Unio, ec viziti unu la alian por interkonatiĝo kaj kunvivado. Tio nomiĝis Alternativa Komunikado inter Europaj Lernejoj (AKEL).

La kontakto ekis el la apudlisbona mezlernejo Braancamp Freire de Pontinha (Portugaliao) kaj sekvis kelkaj mezlernejoj, el kiuj finfine almenaŭ du pliaj — Cuatro Caminos de Don Benito (Hispanio) kaj Gimnazio n-ro 7 de Koszalin (Pollando) — sukcesis realigi siajn planojn.

Tio ekokazis meze de februaro 2005, kiam grupeto de polaj lernantoj kaj instruistoj veturis al Pontinha kaj Don Benito por interŝanĝi siajn spertojn pri instruado de E-o kaj interkonatiĝo kun fremdaj kaj lernejoj kaj kulturoj. La kunvivado en familioj, la turismado, la uzado de kvin (!) lingvoj (la tri propraj kune kun E-o kaj la angla, ĉar la regado de E-o ne sufiĉis) tute kreis neforgeseblan vivsperton.

Sekvis komence de aprilo 2005 la veturado de grupoj portugala kaj hispana al Koszalin. Survoje ili vizitis Berlinon, kie HEF-Bulteno n-ro 370



oni profitis la okazon kontakti lokajn esperantistojn, kiuj afable helpis ilin. En Koszalin la ibera grupo ne nur interkonatiĝis kun la pola instrusistemo kaj lokaj esperantistoj, sed ankaŭ mezlaboris kaj mezludis per lingvaj ekzercoj. Denove oni uzis la kvin lingvojn. Krome, tio koincidis kun la sociaj okazaĵoj rilate la morton de la pola papo.

Bedaŭrinde temas pri grupoj de lernantoj kaj instruistoj kiuj ĝenerale ne regas la lingvon kaj nur alproksimiĝas al E-o. Tamen ni esperu, ke tiu sperto helpu pluan lernadon kaj uzadon de nia lingvo. Se la projekto daŭre estos apogata de la eŭropaj instancoj venontjare (2005-2006) litova lernejo de Gatauciaj eniroj en ĝi. Por la venonta jaro (2006-2007) aliaj lernejoj estus bonvenaj, se ili kontaktos nin dum tiu jaro 2005.

AKEL-teamo

# Fruktodona Kunlaboro

Danke al rekta kunlaboro inter la plej grava organizo laboranta por la internacia antaŭenigo de la hispana lingvo, Instituto Cervantes, kaj Fundación Esperanto, interesitoj de la tuta mondo povas vidi en la virtuala ekspozicio pri tradukoj de Donkiĥoto, aranĝita de tiu grava institucio, la Esperanto-version:

[www.cervantes.es/](http://www.cervantes.es/)

[quijote2005/catalogo.htm](http://www.cervantes.es/quijote2005/catalogo.htm)

Cetere, la retejo de Instituto Cervantes ne nur proponas la kutimajn donitaĵojn pri la libro kaj bildon de ĝia kovrilo, sed ankaŭ skanaĵon de ĝia unua ĉapitro.

[www.cervantes.es/quijote2005/  
esperanto/esperanto.pdf](http://www.cervantes.es/quijote2005/esperanto/esperanto.pdf)

Ni varme gratulas Fundación Esperanto, kiu, denove, sukcese enpaŝas en prestiĝan medion.

*Svena Dun*

---

## Diskoj pli facile akireblaj

La organizajo SATeH proponas al la hispanaj esperantistoj novan servon. Kiel plibonigo de sia libroservo, SATeH lanĉas muzik-fakon, kiu faciligas la aliron al muzik-diskoj en esperanto.

Vi povas peti kompletan katalogon ĉe “Apartado de Correos 8537, ES-28080 Madrid”, aŭ mem viziti la retejon:

<http://personal.auna.com/mmmoral/indice.discos.1.htm>

Tie vin surprizos belaspekta kaj moderna retkatalogo, kaj en la hispana kaj en esperanto, kun rekta ligo al la originala esperanta retejo de Vinilkosmo, tiel ke vi povos rekte interrilati kun la muzik-distribuantoj.

Jen pozitiva novaĵo proponita de SATeH, organizaĵo kiu dum sia mallonga ekzistado daŭre surprizas nin. Fakte ili jam antaŭanoncas la baldaŭan lanĉon de nova ankoraŭ pli moderna reta librokatalogo.

Ni senpacience atendas!



# La "Ateneo de Madrid" kaj Esperanto

La madrida esperantistaro elanas re-novigi sian rilaton kun la veterana institucio Ateneo de Madrid, kie komence de la 20a jarcento, esperanto trovis unu el la plej favorkondiĉan semujon en Hispanio. Rezulte de insistaj kontaktoj kun ateneaj responsuloj, fontis interkonsento organizi regule e-aranĝojn en la salonoj de tiu respektinda institucio.

La unua ĉi-rilata paŝo estis la prelego fare de Antonio del Barrio, la 14an de marto vespere, titolita "Esperanto en Ateneo (1899-1936): Vicente Inglada, Julio Mangada, Emilio Herrera", kiu ĝuste temis pri tiu ora epoko de esperanto, kiam Ateneo vartadis ĝin.

Ĉeestis kvardeko da homoj sed, ĉar surprize ne ĉiuj estis esperantistoj, Antonio devis prelegi hispanlingve sed kun esperantaj tekstoj sur la helpaj lumafiŝoj; foje li elbuŝigis esperantajn frazojn celantajn montri la parolan lingvon al ne-espistoj. Tiu ekstermovada partopreno sendube ŝuldiĝas al apero de alvokaj anoncetoj en la madridaj sekcioj de ĵurnaloj "El País" kaj "El Mundo".

La prelego estis tiel interesa kiel ĉiam kiam Antonio prenas la prelegvicon. Por kiuj ne konas lin, li farĉis sian rakonton per historiaj detaletoj pri la ĉefaj roluloj HEF-Bulteno n-ro 370



Jen sur la foto Antonio del Barrio, Direktoro de Fundación Esperanto, dum sia prelego titolita "Esperanto en la Ateneo de Madrid", kiun li faris en la sidejo de tiu grava kultura asocio.

—la menciataj pioniroj Inglada, Mangada kaj Herrera— kaj montris multajn tiuepokajn fotojn, kie videblis homoj kiujn kelkaj ĉeestintoj eĉ konis persone — ekz. Lucrecia San Antonio.

Fine de la prelego, stariĝis demando-vico plenumita plejparte de tiuj ekstermovadanoj kiuj abunde demandis pri la lingvo kaj ties pioniroj ĵus prirakontitaj.

Nu, ni jam faris breĉon en la rokon. Ni vartu ĝin por ke ĝi ne reŝtopiĝu! Venontan aranĝon en aprilo.

*Manuel Pancorbo Castro*



## Donkiĥoto kaj la infanoj el la mondo

Pli bone ol ajna raporto elokventas pri ĝia kontentiga evoluo jenaj komentoj de la infanoj partoprenintaj la desegno-konkurson “Tia mi vidas Donkiĥoton”:

“Homoj diris pri Donkiĥoto: li estas frenezulo. Sed mi pensas: li estas brava kaj honora kavaliro.” (Viktoria Belova, 11-jara. Volgodonsk, Rusio).

“Mi ŝatas Don Quijote kaj Sancho Panza pro la frenezaj aventuroj.” (Andreu Ballester Camacho, 8-jara. Mallorca, Hispanio).

“Don Quijote pensis ĉion bone, sed ĉio fariĝis malbone.” (Kamila Drábiková, 9-jara. Opatovec, Ĉeĥio).

“Li estis granda romantiko. Li senĉese volis fari bonon, sed li ne sukcesis. Li vivis en propra mondo kaj ne rigardis realecon. Sia maniere li estis nobla kaj


tre bonkora frenezulo.” (Iveta Novotná, 13-jara. “eská Trébová, Ĉeĥio).

“Tia mi vidas la hispanan legendan heroon Donkiĥoto, kiu intencas fari novan heroaĵon.” (Pak Oleg, 13-jara. Volgodonsk, Rusio).

“Mi pensas, ke Don Quijote havis bonan koron, volis helpi al homoj kaj freneza li ne estis.” Miriam Merková, 11-jara. Opatovec, Ĉeĥio).

Kiam mi verkas ĉi artikolon, estas jam ricevitaj en la HEF-ejo dektri kontribuoj: unu el Majoroko (Hispanio); du el la lernejo “Ŝanco” en Volgodonsk, rostova regiono (Rusio); kaj dek el Opatovec, Ĉeĥio. Eblas vidi la ĉarmajn desegnojn en la retejo: [www.esperanto-es.net/quijote](http://www.esperanto-es.net/quijote), en la fako “konkurso”. (Kaj ankaŭ eblas okaze de la ekspozicio muntota pri la

→ Pluas sur la 20a paĝo  
HEF-Bulteno n-ro 370



## Laŭtlegado de Donkiĥoto, ankaŭ en Esperanto

Denove ĉi-jare, koincide kun la Internacia Tago de la libro, kiu kunmemoras la forpason de Cervantes, la madrida kulturinstitucio Círculo de Bellas Artes organizis seninterrompan kompletan laŭtlegadon de la verko Donkiĥoto de La Manĉo. La agado daŭris 48 horojn, de la 22a ĝis la 24a de aprilo, kaj oni uzis dudekon da lingvoj, oni konektis kun diversaj institucioj en la tuta mondo, kaj partoprenis tuta speco de homoj, de la prezidanto de la registaro aŭ konataj artistoj, ĝis centoj da anonimuloj.

Tiun ĉi jaron la agado havis specialan signifon, pro la koincido kun la kvarjarcenta datreveno de la unua publikigo de la verko, en 1605, kaj la kunmemoro organizita de diversaj instancoj.

Duan fojon Esperanto estis tie. Inter la specialaj partoprenoj, la organizantoj kalkulis je nia kunlaboro, per la legado HEF-Bulteno n-ro 370

de kvar pecoj de la traduko kiun faris Fernando de Diego kaj eldonis Fundación. Tio okazis je la sama Tago de la Libro, la 23an, je la 5a horo vespere, kaj la selektitaj pecoj, proksimaj sed ne sinsekvaj, estis du el la ĉapitro 18 de la dua parto, kaj du el la komenco de la 19a.

La legadon komencis kaj malfermis Toño del Barrio kaj Manolo Parra. Sed ni aparte menciuj la du aliajn legintojn: unu estis Francisco Javier Moleón, kiu tre aktivis movade kaj beletre antaŭ kelkaj jaroj, sed lastatempe ne estis tiom partopreninta niajn agadojn, sed kiu pruvis ke li tute ne forgesis la lingvon, legante laŭ maniero tre klara kaj eleganta. La dua estis juna germana samideanino, Mirjam Larissa Walker, kiu troviĝis en Madrido dum tiuj tagoj, kaj kiu regalis la aŭskul-

→ Pluas sur la 20a paĝo



## Buse al UK!

(unua ebleco)

Prepariĝas aŭtobusvojaĝo al la UK en Vilno (Litovio). Oni iros per regula aŭtobuso el Hispanio ĝis Pollando, kaj de tie, per aŭtobuso de Monda Turismo Esperanto, al Vilno.

La prezo de ĉiuj transportoj, plus loĝado en Vilno, plus dumkongresaj ekskursoj, estos ĉirkaŭ 500 eŭroj ĉiu persono (depende de la kvanto de aliĝantoj, kaj de la dato de rezervo). Tiu prezo estas konfirmata ĝis la 15a de majo. Poste eble estos altigo de la kotizo.

### Emas korespondi

Mi estas Andy Hernández Mtnez, katolika filatelisto 19-jara. Mi tre ŝatas la hispanan kulturon kaj historion kaj deziras havi amikojn en Hispanio. Atentu ke via aĝo ne gravas. Jen mia adreso: calle Alejandro Rodríguez, edificio 5 bloque 3 apto 5; 72810 Florida-Camagüey; Cuba.

Fine de la kongreso estos eble resti en Pollando kelkajn tagojn, ĉar la reven-vojaĝo okazos per regula internacia aŭtobuslinio Pollando-Hispanio. Se vi prokrastos la revenvojaĝon, oni povas organizi por vi turisman programon en Pollando.

Kongresa aliĝo ne estas inkluzivita en tiu prezo. Pliajn informojn vi povas ricevi ĉe la retadreso [augustocasquero@hotmail.com](mailto:augustocasquero@hotmail.com)

(Dua ebleco kun partopreno en du e-aranĝoj en Latvio kaj Estonio  
10.07-3.08.2005)

10.07.2005 Eliro el Hispanio, aŭtobuse.

12.07.2005 Alveno en Pollandon

Pollando - Litovio - Latvio - Estonio - fakultative Finnlando - Latvio - Litovio - Pollando (per aŭtobuso)

13-14.07 Bydgoszcz, Varsovio, Kaunas, Siauliai, Kruca Monto, Riga, Tallinn, vizitado, tranokto.

15.07 Fakultativa ekskurso per flugŝipo (ĉ. 30 eŭroj) al Helsinki, vizitado: Katedralo, Senata Placo, Uspiena Koncilio, reveno al Tallinn, vojaĝo tra markurorto Parnu al Riga, tranokto.

15-22.07 Partopreno en la 15a Internacia F-Kongreso kaj la 41aj Baltaj F-Tagoj en Riga (Latvio): Interkona Vespero de la 15a IEK kaj 41a BET.

16.07 Inaŭguro de la 41a BET kaj 15a IEK, komuna vojaĝo al Jurmala kaj Tukums, kaj partopreno en la Folkloro Festivalo, vizitado, reveno por tranokto en Riga.

17.07 Vizitado de Riga, koncerto de la ensembloj en la centro de la urbo por la loĝantoj, tranokto.

18.07 Ekskurso al Kurlando al duoninsulo Kolka, vizito en Kulturcentro de Livoj, Nacia Parko Slitere, Ventspils, reveno tra historiaj regionoj de Kurlando kaj Livonio por tranokto en Riga.

19.07 Partopreno en la programo de 41a BET kaj 15a IEK en Riga, ŝipekskurso sur rivero Daugava - Diskutoj pri la turismaj temoj reveno por tranokto en Riga.

20.07 Ekskurso laŭ itinero de inflantaj kasteloj: Cesis - Sigulda kaj Parko Muzeo Turaida, Groto Gutmana, Nacia Parko Gauja, reveno al Riga por tranokto.

21.07 Fermo de la 41a BET kaj 15a IEK, libera tago, tranokto en Riga.

22.07 Vojaĝo el Riga tra Latgalio -Aglo- ne- Daugavpilis al Vilno, vespera promeno, tranokto.

23-30.07 Restado en Vilno kaj partopreno en la 90a UK, vizitado de la urbo: Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo,



Universitato, Urbodomo, Aŭrora Pordego, ortodoksa preĝejo de S-ta Triono, Preĝejoj de St. Petro kaj Paŭlo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombejoj Rasos kaj Paneriai, kaj tuttaga busekskurso laŭ itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno - Druskininkai - Veisiejai - Alytus - Birstonas - Trakai - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesasanktejo, tranoktoj en Vilno.

30/31.07 Vojaĝo al Kaunas, vespera promenado tra la urbo, Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas kaj Esperanto Domo ĉe la strato L. Zamenhofo 5, nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Torun al Bydgoszcz.

01.08.2005 Aŭtobusa reveno al Hispanio (du tagojn).

Tuta prezo de la dua ebleco: 850 eŭroj

*Augusto Casquero*

La retpaĝo pri la **64a Hispana Kongreso de Esperanto**, okazonta en Alcalá de Henares de la 7a ĝis la 10a Julio 2005, troveblas ĉe:

**[www.esperanto-es.net](http://www.esperanto-es.net)**

aŭ rekte ĉe:

**[www.esperanto-es.net/congreso2005/](http://www.esperanto-es.net/congreso2005/)**

Tie vi trovos ĉiajn necesajn informojn pri aniĝo:

**[www.esperanto-es.net/congreso2005/formularo.htm](http://www.esperanto-es.net/congreso2005/formularo.htm)**

Kotizoj, hoteloj, provizora programo, priskribo de la kongresurbo, ligiloj al paĝoj de la Urbodomo de Alcalá pri autobusoj, trajnoj ktp.

konkurso kadre de la Hispana Esperanto-Kongreso en Alcalá de Henares).

Krome anonciĝis la partopreno de la lerneja esperanto grupo “Betuleto” el urbo Ĉeboksari (Rusio); de la lernejana grupo “Esperanto” ĉe Domo de Infana Kreado el Ŝumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, (Rusio); kaj de kelkaj lernejanoj el la urbo Torun (Pollando). Ĉi lastaj jam sendis per retroŝto kelkajn el la interesaj komentoj:

“Mi ŝatas lin meze, ĉar li estas stulteta kaj povas fari ion malbonan.”

“Donkiĥoto estas sama ol bebo — iom stulta, sed ĉiam simpatia.”

“Movigis lin vento kaj li volis batali!”

“Li estas pli bona por knaboj, sed mi povas ridi pro liaj aventuroj.”

“Li estas stranga kaj amuza, sed ja ĉiu povas esti tia.”

“Donkiĥoto tre volis esti bona kaj tio gravas.”

Evidente nia heroo trovis jam multajn amikojn, ĉefe en meza kaj orienta Eŭropo, sed li volus konatiĝi kun infanoj el la tuta mondo. Ĉu vi ne ŝatus amikiĝi al ĉi frencza bonulo? Ne forgesu, ke la limdato por ricevado de descgnoj prokrastiĝis ĝis la 30a de junio. Ankoraŭ estas tempo!

*Ana Manero*

tantojn per speciale sekura kaj belvoĉa rakontado.

La legado estis filmita, kaj oni povis sekvi ĝin ne nur en la ejo, sed ankaŭ en la tuta mondo danke al la dissendo reĉta kaj la montrado en diversaj institucioj. Estas interese substreki ke dum la legado en nia lingvo, tiu cirkonstanco estis montrita sur la ekrano, per teksto en kiu, krom la nomo de la partoprenanto, aperis la klarigo “Lee en esperanto”. La legado estas trovebla ankoraŭ en la reta adreso <http://www.campusred.net/aulaabierta/asp/Quijote.asp>.

La agado ne havis specialan komunikilan sekvon, sed ni menciu ke kelkaj ĉeestantoj tre afable gratulis, kaj iuj eĉ komentis ke ili unuafoje post multaj jaroj aŭskultis nian lingvon, pro kio ili speciale ĝojis.

Ĝis venonta jaro do (aŭ venonta urbo).

*TdB*

---

## “Le Monde Diplomatique”

**Vera lukso en Esperanto!**

**<http://eo.mondediplo.com>**

---

**Kontonumero de**

**HEF ĉe BBVA:**

**0182-1252-31-0204011961**


---

# Dumkongresa omaĝo al Fernando de Diego

Donkifoto parolas esperanton: jen la devizo de nia ĉijara kongreso. Kaj jen Fernando de Diego, la majstra reganto de la lingvo, kiu ebligis tiun ensorĉon. Ne eblas do pli taŭga momento, por ke la hispanlingva esperantistaro montru sian admiron kaj dankemon al la homo, kiu paroligis esperanton al la plej universala heroo el nia literaturo. Eĉ se nur tion li farintus, li ja meritis omaĝon. Sed li faris multe pli, kiel konsulteblas en la pria retejo [www.esperanto-es.net/quijote/](http://www.esperanto-es.net/quijote/), fako "la tradukinto, kompleta bibliografio".

Multo dirindas pri liaj beletraĵmeritoj, sed prefere ni lasu fakulojn paroli pri:

"Fernando de Diego, ĵurnalisto kaj filologo, estas la aŭtoro de "Gran Diccionario Español-Esperanto" (Granda Vortaro Hispana-Esperanto (50.750 kapvortoj), kaj de du elegantaj eseoj pri tradukarto kaj literatura kritiko. Tamen lia originala verkaro minimumas en komparo kun lia enorma tradukado el la hispana kaj aliaj lingvoj en esperanton. Fernando de Diego estas ĥirurgo de la vorto:



la rigoro, la alĝustigita frazo, la perfekte-mo kaj, ĉefe, la lerteco, distingas la probable plej bonan stiliston kaj vortoriĉan aŭtoron en esperanto" (Antonio Valén, traduko el la postkovrilo de la tria eldono de "Nuevo método de esperanto", Ed. Gram. Madrid 2001)

"Ĉiuj postaj tradukemuloj devas vole-nevole sekvi liajn paŝojn aŭ fiaski. Sed ne malpli grava pruviĝas lia influo ankaŭ en la originala beletro, en la lingvaĵo kaj stilo de almenaŭ, sed ne nur, la verkistoj de la ibera grupo". (Jorge Camacho, el la priskribo de lia kongresprelego "Influo de Fernando de Diego en la originala E-beletro")

"Ido de l' akvo, hule, plaŭde, ŝaŭme vi tajlas parolkonkojn. Puntas dirojn. Pedante? Ne. Torente? Ne. Vivtakte! Tra via plumo fontas vi mem sen artifiko. El via plumo lirlas plurdimensia belo, ho amanto de la kolor', sonor', sapor' de l' vortoj!"



# Ĉirkaŭ la mondo

\* La Konsilio de la Departemento pri Sciencoj de Lingvaĵo de la Fakultato pri Beletro de la torina Universitato starigis bibliotekon de libroj pri Interlingvistiko kaj Esperantologio. Simila biblioteko troviĝas ankaŭ en Milano ĉe Instituto Universitata pri Moderna Beletro.

*F.A. Pennacchiotti*

\* Aperis Filmo pri la Monda Socia Forumo, okazinta en pasinta januaro en Portalegro, Brazilo, kiun partoprenis pluraj esperantistoj.

<<http://ĝangalo.com/blogo/Forumo.html>>.

---

→ Daŭrigo de la 21a paĝo

(Miguel Fernández, el la “Omaĝo en oda kleo al Fernando de Diego” de la verko “El la sonoraj soloj”. Eld. IEM, 1996)

Ja ne mankas kialoj por la omaĝo. Venu do kunfesti ĝin en la kongreso. Kaj nepre legu liajn verkojn, elektu inter ili laŭ viaj preferoj kaj ŝatoj: ne ekzistas pli bona komplimento al kvalita verkisto ol ĝui la rezulton de ties talento kaj peno.

*Ana Manero*

La evento memorindas ĉar, interalie, ĝi estis tre bela ekzemplo pri kunlaboro inter esperantistoj. Parotprenis UEA, Brazila E-Ligo, la loka E-Grupo, SAT kaj ĵus kreita asocio “Liberio por la lingvoj”.

*R. Corsetti*

\* Korea Fremdlingva Universitato oficiale akceptis Esperanton kiel lerno-objekton en 2005. Ĉi decido signas jam la trian sukceson en Koreio kadre de universitata kampo, sinsekve Univ. Dankook kaj Wonkwang. Gratulmesaĝoj bonvenindas. ĉe la retadreso de Prof. LEE Young-koo: <[ykli@hufs.ac.kr](mailto:ykli@hufs.ac.kr)>

*LEE Jung-kee*

\* Aperis la disko “Rebela sono” de la finna grupo Dolchamar. Kajto lanĉis sian novan diskon “Lokomotivo, rulu nun!” kiu konsistas el originalaj kanzonoj pri trajnoj.

*Vinilkosmo*

\* Jam troveblas en la reto nova numero de Le Monde Diplomatique en Esperanto: <<http://eo.mondediplo.com>>

*M.Z.*

\* La Skolta Tutamerika Ĵamboreo 2005 okazinta en San Rafaelo, Mendoza



(Argentino) kun la partopreno de dekkvin mil skoltoj... kaj Esperanto-budo, montris ke la skolta movado estas vera orminejo por disvastigi Esperanton.

### *Skolta Esperanto-ligo*

\* “La ĉashundo de la Baskervilo” de Arthur Conan Doyle, tradukita de William Auld estas elektronike eldonita de “Sezonoj” kaj ĝi legeblas jam ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo> en la rubriko “Anglalingva literaturo en Esperanto”. En la sama retejo legeblas verkoj de James Branch Cabell, Lewis Carroll, Harry Harrison, Jerome K. Jerome, O Henry, Edgar Allan Poe, Saki, J.R.R. Tolkien, Mark Twain k.a.

### *Sezonoj*



Sergio Docal kaj Elena Baltaretu, ĉarma rumana samideanino, kiuj interkonatiĝis en hispana kongreso en julio 2001, geedziĝis fine de 2004.

\* Se vi interesiĝas pri tango-dancado, aŭ se vi ŝatus vidi E-tradukon de tago, vizitu:

<[www.fundaciontango.com.ar](http://www.fundaciontango.com.ar)>

(klaku sur “mision”)

*A. Cossavella.*

\* Eldonejo Casterman, oficiala eldonejo de la aventuroj de Tinĉjo, prezentis en la 100-jariĝa E-Kongreso okazinta la 25an de Marto en Bulonjo-sur-Mar, la esperantlingvan version de “Tinĉjo en Tibeto”, eldonita en la kvanto de 4.000 ekzempleroj. Tutmondaj kolektantoj de Tinĉjo-albumoj ŝajne jam faris grandkvantajn mendojn.

*Radio Polonia*

\* La Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos ĉi-somere (05.07.31/05.08.07) en Zakopane (Pollando), organizita de TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo). Jam aliĝis 380 homoj. Informoj ĉe: <[www.tejo.org/ijk/](http://www.tejo.org/ijk/)>



Ĉu vi volas helpi la movadon

kaj ne scias kiel?

**Fundación Esperanto**

estas la ...respondo!

**Kontribuu pere de:**

Iber-Caja

**2085-0101-13-0128624762**

La Caixa

**2100-2149-31-0100165085**

## Dumkongresa loĝado

La LKK de la hispana E-kongreso ne respondecas pri rezervo de hoteloj. Tamen jen kelkaj indikoj por fari rezervon.

1) Rekta rezervo, t.e. mendo per persona telefona alvoko al la elektita hotelo. La kongresonto mem elektu hotelon el la tabelo proponita sur la 29a paĝo de Boletín 369. La prezoj kongruas kun la kategorio de la loĝejo, indikita per steleto(j) sur la tabelo.

2) Rezervo per vojaĝ-agentejo.

3) Interretanoj trovos grandan avantaĝon rezervante kaj mendante hotelon per unu el la portaloj dediĉitaj al tiu celo,; ekzemple “Hotelkey”, kiu ebligas mendi kaj telefone: 902.180.743, kaj rete:

<http://hotelkey.com/es>

Hoteloj Alcalá:

[http://alcala\\_de\\_henares.hotelkey.com/hotel/alcala\\_de\\_henares/madrid/espana/europa/1136/es](http://alcala_de_henares.hotelkey.com/hotel/alcala_de_henares/madrid/espana/europa/1136/es)

ankaŭ “LaNetro”:

<http://madrid.lanetro.com/>

Avangardaj uzantoj de Interretoj povas esplori per Google.

*Darío Rodríguez*



## La lumpiramido

Via laborestro streĉigas vin, via bopatrino ofendiĝas pro via streso... Ne mankas kialoj por nervoziĝi en ĉi premega socia vivo, sed tute ne gravas ! Jen kreiĵo tute malbanala por la E-mondo, kiu proponas solvon irante rekte al la radiko de la ĉiutagaj streĉiĝoj kaj provas dompti ilin je la nivelo de la konscio mem kiu nutras ilin.

La lumpiramido estas disko preparita por meditado kun bela leĝera muziko de Marcus Pengel. La voĉo de Jürgen Wulff gvidos vin al via lumpiramido. En stato de profunda senstreĉiĝo kaj trankvilo vi povas adapti viajn konvinkojn kaj sintenojn por pli facile atingi viajn celon.

La stato de rilaksiĝo en kiu vi certe atingos lasante vin luli pere de magia sono povas ankaŭ esti bonega inklino je penetriĝo per la ritmo ne malpli envulta de esperanto, elektita ĉi tie pro ĝia universaleco kaj simpleco de ĝiaj komponantoj.

La KD-on produktis la eldonejo Ni-gra Kato en Hamburgo.

Aŭskultu fragmenton ĉe:

<http://www.vinilkosmo.com>

## Jarabonoj kaj kotizoj por 2005

<b>Boletín de HEF</b> (eksterlandaj abonantoj, enlandaj vidu sur la 32a paĝo).....	30 €
<b>RET-INFO</b> (12 monatoj).....	19 €
✓ [P] HEF.	

### Universala Esperanto-Asocio

Individua Membro kun Gvidlibro MG .....	9 €
Individua Membro kun Jarlibro MJ (-T) .....	22 €
Individua Membro plus abono al E-o MA (-T) .....	55 €
Simpla abono al Esperanto, sen membreco (SA).....	35 €
Simpla abono al Kontakto, sen membreco (Kto).....	21 €
Societo Zamenhof, sen membreco en UEA (SZ) .....	110 €

✓ Rim: La kategorio (MG) ne rajtigas rabaton en la UK. La kategorioj MJ kaj MA inkluzivas por la junuloj (ĝis 29j.) membrecon en TEJO kaj ricevon de Kontakto. [P] Pedro A. Garrote; Apartado 119 — Esperanto; 47080 Valladolid; Banco Español de Credito (BANESTO), Konto: 0030 6002 74 0000901271.

<b>La Gazeto</b> (ses numeroj) (nur por la unua jaro 20 €).....	27 €
[P] Barcelona E-Centro; Bassegoda 40, 3 <sup>a</sup> , 1 <sup>o</sup> ; 08028 Barcelono.	

<b>Heroldo de Esperanto</b> .....	32 €
-----------------------------------	------

<b>Femina</b> .....	20 €
---------------------	------

<b>Literatura Foiro</b> .....	30 €
-------------------------------	------

<b>Internaciisto</b> .....	15 €
----------------------------	------

<b>La Ondo de Esperanto</b> (12 numeroj jare) .....	27 €
---	------

<b>La migranto</b> .....	10 €
--------------------------	------

[P]: Luis Serrano; C/ Font Nova, 32; 08202 Sabadell; Tel. (93) 7275021; Banco Sabadell n-ro: 0081 0900 82 0006712480. (Por bank-ĉeko aldonu 1,5 EUR)

<b>Sennaciulo</b> (kotizo al SAT + abono + Sennacieca Revuo) .....	36 €
--	------

[P]: Pedro Sanz; pmariass1@auna.com; Uno-e de BBVA, Konto: 0227 0001 85 0200526929.

<b>SATeH</b> (kotizo) .....	6 €
-----------------------------	-----

[P]: Pedro Sanz; pmariass1@auna.com; Caja Madrid, Konto: 2038 1787 43 6000182731.

<b>Kajeroj el la Sudo</b> . (Trimonata).....	? €
--	-----

[P]: Jesús de las Heras, Apartado 4461; 30080 Murcia. Banko-konto: La Caixa, 2100 4455 71 0200022454.

<b>KAE-Infomilo</b> .....	8 €
---------------------------	-----

[P] Santiago Torné; Roca 22, 3-cr, 1-a; 08208 Sabadell; Caixa 21000461960200045498.

HEF-Bulteno n-ro 370

# Kultura Esperanto Festivalo denove en Finnlando



Kultura Esperanto Festivalo (KEF) okazas refoje post kvin jara paŭzo. La plej lasta okazis en Helsinko en 2000 kaj nun KEF revenas la duan fojon al Helsinko. Ĉi somera KEF okazos de la 16a ĝis la 23a de julio en la artisteca kvartalo de Helsinko, Kallio.

KEF estas unika koncepto inter esperantoaranĝoj: unusemajna festivalo kies devizo estas ĝuado de altkvalita esperanta kulturo sen troa konsidero al la lingvo mem aŭ ĝiaj propagandaj efikoj. De 1986 la festivalo okazis en iu nordia lando, Svedio, Danio kaj Finnlando.

KEF estas ne nur gravega forumo por prezenti kaj konsumi esperantan kulturon kaj instigi homojn al kreemo, sed ankaŭ unika eblo al esperantaj artistoj renkonti sin kaj eĉ iniciati novajn projektojn. Pro iamaj KEF-oj jam naskiĝis pluraj kulturmondaj fenomenoj en Esperantujo. La plej fama el ili estas sendube la bando Persone, kiu origine celis ludi nur por la unua KEF en Upsalo. Pro la plej lasta KEF 2000 en Helsinko estis lanĉitaj i.a plene esperantlingva diskoteko, reali-

gita de Floreal Martorell (Vinilkosmo), kaj vasteta ekspozicio pri esperanta komiksarto. Pluraj novaj kaj malnovaj artistoj ankaŭ disfamiĝis al la granda espubliko tra KEFoj. En 2000 okazis preskaŭ la unua surscenejiĝo de la nun tre fama Dolchamar kaj la unuaj akustikaj paŝoj de Dolchamar, kiu la unuan fojon ĉi-somere koncertos ankaŭ kun plene akustika repertuaro.

“Organizi Kulturen Esperanto-Festivalon postulas sufiĉe grandan budĝeton, se oni volas havi kulture altkvalitan programon. Se ni organizus internacian semajnon ekzemple naturteman en Finnujo, la budĝeto estus supozeble dekono de tiu de kultura festivalo. Verŝajne ĝuste pro monaj kialoj KEF ne okazis dum la lastaj kvin jaroj”, rakontas Riitta Hämäläinen de KEF-teamo. “En nia ĉi-jara KEF ni havos eĉ tri ekstereŭropajn artistojn: artikoliston-tradukiston-eseiston Probal Dasgupta el Barato kaj sudamerikajn muzikistojn Alejandro Cossavella kaj Flavio Fonseca. Ni refoje havas bonegan literaturan programon sub temo “Korpo kaj kulturo” kaj ĉi-jare aparte vastan muzikan kaj teatran programon. Niaj specialaĵoj estos plene esperanta opervespero, filmodublada konkurso, laborgrupoj pri beletra tradukado



kaj artikolverkado, esperantaj krimromanoj kaj erotika poezio. La plej amuza programero estos verŝajne esperanta karaokeo kun la efektiva bando mem — se nur iu kuraĝos karaoke kanti “Ĉu vi pretas” kun Dolchamar”, ridetas Riitta.

“Eble ne ĉiam estis tiel, sed laŭ mia opinio la nuntempa esperanta publiko ja scipovas aprezi bonan programon kaj artistojn. Almenaŭ ni tion esperas kaj tial indas organizi KEFon refoje.”

Survoje do al UK kaj IJK indas veni viziti Finnlandon. Pro muziko, literaturo, teatro, interesaj kulturemuloj kaj jen 30 pli ekzaktaj kialoj:

- Dolchamar (eĉ akustike!)
- Esperanto Desperado
- JoMo kaj Liberacanoj
- Alejandro Cossavella kaj Porkoj
- Flavio Fonseca
- Martin Wiese
- Ĵomart, Nataŝa kaj Karina
- Timo Vöönönen kaj elektra kanteleo
- Liisa Viinanan kaj “preskaŭ tutvespera esperanta opero”

- Fraŭlino Barlaston
- Nova, finna teatra grupo

HEF-Bulteno n-ro 370

- Arnau Torras
- Duplustro
- Floreal Martorell
- Jorge Camacho
- Sten Johansson
- Anja Karkiainen
- David-Emil Wickström
- Ŝamana vespero en finna naturo
- Filmodublado
- Voĉouzado
- Esperanta karaokeo kun vivbando
- Filmoj kaj teatraĵoj
- Komiksekspozicioj
- Korpolingvo
- Erotika poezio
- Viroj kaj virinoj de literaturo
- Ĉiumatena aerobiko laŭ espomuziko
- Diskotekoj kaj ĉiunokta dancado
- Aparta infana programo kaj dum-kefa infanvartejo

Pliaj informoj pri KEF 2005:  
[www.esperanto.fi/kef2005](http://www.esperanto.fi/kef2005)

*Riitta Hämäläinen*  
(prezidanto de KEF-teamo)

## Aniĝilo por 2005

(Foto)kopiu kaj poŝtu aŭ faksu al la HEF-oficejo, Bv. skribi klare.

### Personaj datenoj :

Kompleta nomo : ..... Annumero: .....

Adreso : .....

Poŝtkodo kaj urbo : ..... Tel. : .....

Naskiĝdato : ..... Retadreso: .....

### Aniĝo :

OM ordinara membro ..... 30,00 €

kun junulkarto ..... 27,00 €

PM patrona membro ..... 60,00 €

KM kolektiva membro ..... 60,00 €

EM (nur por jamaj EM-anoj 1995c) ..... 25,00 €

Ĉiu ano ricevas *Boletín*; infanoj ĝis 12 jaroj *Juna Amiko*; junuloj inter 13 kaj 30 jaroj, *Kontakto*.

Kaj ĉiuj, ĝenerale, 10% rabaton en la aktivaĵoj organizitaj de Hispana Esperanto-Federacio.

### Pagmaniero :

Bankordone (plenigu la malsupran formularon).

Enspezo en konton 0182-1252-31-0204011961 de BBVA (kunsendu spezilono).

Ĉeko por "Federación Española de Esperanto" (aldonu 3 EUR).

Elspezo en la konton hefb-m de U.E.A. (kunsendu ĝirilkopion).

Subskribo:

Dato:

### DOMICILIACIÓN BANCARIA

Banco o caja:

Dirección:

Código postal y localidad:

C.C.C.: \_\_\_\_ / \_\_\_\_ / \_\_\_\_ / \_\_\_\_\_

Entidad

Sucursal

D.C.

Cuenta

Muy señores míos:

Les ruego atiendan con cargo a la cuenta arriba indicada los recibos que les sean presentados por la Federación Española de Esperanto en concepto de cuota anual, hasta nueva orden.

Fecha:

Nombre y firma del titular:

## Nova Provizora Programo

### Prelegoj

\* Fernández, Amelia: La imagita Kihoto. Ĉefaj linioj de ĝia beletra rekreado en la 20a jarcento. (Hispane)

La allogo de la kihotaj roluloj estis konstante sentata ekde la publikigo de la verko. Ni vidos kiel pluraj landaj kaj eksterlandaj aŭtoroj imagis la verkon dum la 20a jarcento kaj ĉefe kiel, akceptante la cervantesan inviton, ili aliigis la rolulojn en realajn estaĵojn.

\* Camacho, Jorge: Influo de Fernando de Diego en la originala E-beletro. (Esperante. Kadre de la planita omaĝo al Fernando de Diego.)

Fernando de Diego estas konata kiel la plej bona tradukisto de beletro el la i. a. hispana lingvo al esperanto, kaj ĉiuj postaj tradukemuloj devas vole-nevole sekvi liajn paŝojn — au fiaski. Sed ne malpli grava pruviĝas lia influo ankaŭ en la originala beletro, en la lingvaĵo kaj stilo de la almenaŭ, sed ne nur, la verkistoj de la iberia grupo.

\* Valén, Antonio: La tradukoj de Fernando de Diego. (Esperante. Kadre de la planita omaĝo al Fernando de Diego.)

HEF-Bulteno n-ro 370

\* Camacho, Jorge: “Gigantoj kaj muelejoj de Esperantujo” (Esperante)

Ankaŭ en la eta sed densa Esperantujo ekzistas muelejoj kaj gigantoj, ne nur en la figura senco cervantesa sed ankaŭ en tiu strikta: gigantoj (tamen ne monstroj) de niaj historio kaj beletro, kaj lokoj kie oni muelas la tritikon ĉiutagan...

\* Galadí, David: Sancho Panza legas la horon en la ĉielo: pri-astronomiaj komentoj al la 20a ĉapitro de la unua parto de “Don Quijote”. (Esperante)

En la 20a ĉapitro de “Don Quijote”, Sancho intencas legi la horon en la nokta ĉielo por intenci konvinki Donkihoton, por ke li atendu ĝis la mateniĝo antaŭ ol iu kuraĝa agado. Kvankam Sancho legas la horon tute fuŝe, la metodo, kiun li uzas, estas de antikve konata en Hispanio kaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Kiel ni povas hodiaŭ, kiel Sancho siatempe, legi la horon dumnokte nur rigardante la stelojn?

\* Pancorbo, Manuel: 1905: la revolucio de Einstein en Fiziko. (Esperante)

\* Rodríguez, Darío: Naskiĝo de lingvo: de Bialistoko al Bulonjo. (Esperante).

La preleganto analizos la sufokigan ctozon kiu regis en Bialistoko, la naski-



ĝurbo de Zamenhof, kaj kiel ĝi inspiris al nia juna idealista heroo la ideon krei internacian lingvon por solvi la problemon de nekomunikado en plurlingvaj socioj. Poste oni esploras la malfacilajn unuajn paŝojn de Esperanto ĝis la okazigo de la triumfa Unua Kongreso en Bulonjo, antaŭ 100 jaroj.

## Prezentoj

\* Sancho, Miguel Ángel: Projekto Kifoto-2005. (Esperante).

La preleganto prezentos la ĉefajn celojn de la projekto kaj la proponitajn aktivajojn de HEF en kunlaboro kun Fundación Esperanto por atingi ilin. Posta debatondo.

\* Vilarroig, Pedro: Kosmologia Suito.

Muzikpeco akompanata de elkomputilaj bildoj. Kvankam ĉi aŭdovida komponaĵo estis unue elpensita el muzika vidpunkto, la aŭtoro klopodis aldoni kiam oportune spektindan bildon pri tio, kion la muziko priskribas.

\* Rodríguez, José: Donkiĥoto kaj la malkomunikiga sorĉo. (Hispane. Programero malferma al la ĝenerala publiko).

Animacia filmeto inspirita de “Donkiĥoto eksterlande”, la du lastaj ĉapitroj de la verko “Kanavale” de Abel Montagut, IEM, Vieno 1997.

\* Camacho, Jorge: Saturno kaj Celakantoj: du poemaroj

En septembro 2004 aperis samtempe, kiel dunaskitoj, du poemaroj de Jorge Camacho. Ambaŭ kune enhavas ĉiujn liajn poemojn de 1989 ĝis la nuntempo, tamen prezentas malsamajn poemojn. La diferenco troviĝas en tio, ke “Celakantoj” (nomo de fiŝo malfosilia) enhavas poemojn verkitajn nur en esperanto, kaj estas do unulingva libro. Kontraste, “Saturno” enhavas ĉefe lian dulingvan poemadon paralele en la hispana kaj esperanto ekde la jaro 1995 (kun kelkaj unuopaj tradukoj).

\* Casquero, Augusto: Roman Dobrzynski: “Sieĝoj de Malborko” (Varsovio 2004) kaj “Valencio en fajro” (Varsovio 2004).


La preleganto prezentos ĉi du filmojn de la konata esperantisto-jurnalisto-verkisto. La unua filmo montras kiel la lokaj esperantistoj kontribuas al la evoluo de sia urbo, Malborko (norda Pollando), fama pro la plej granda mezepoka brika fortreso en la mondo. La dua temas pri la hispana urbo Valencio kaj ĝia grandioza festo de strat-fajroj.

\* La pedalaŭto: Prezento de la komerca filmo de Ramón Barea kaj Álex Angulo subtitolita en esperanto.

Esperantistoj ne nur helpis dum filmado (la ĉefrolulo paroletas esperanton



en pluraj okazoj kaj Hispana Esperanto-Federacio konsilis pri prononcado kaj etosigo). Alia grava tasko venis poste: esperantigo de la subtitoloj cele al komerca distribuado de la DVD-a filmo. Tradukis Joxemari Sarasua, reviziis la tradukon Gonçalo Neves. Kunordigis kunlaboron de kinistoj kun esperantistoj Manuel Pancorbo. Bela ŝanco spekti la filmon kaj poste starigi debatiron pri.



Alcalá atendas nin

## Distraj programeroj

\* Galadí, David: Stelrigardada astronomia nokto.

Praktika sesio pri la “sanĉopanza” metodo legi la horon en la ĉielo. Aldone, ni konos la someran ĉielon kaj ni rigardos ĝin nudokule, per prismo-lornoj kaj per astronomia teleskopo.

\* Muzeo-domo de Cervantes: Vizito kaj donacado de ekzemplero de “La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha”.

\* Turisma konatiĝo kun Alcalá de Henares.

\* Barrio, Toño del: Surpriza programero. Nur venu kaj vidu!

## Ekspozicioj

\* Manero, Ana: Tia mi vidas Donkiĥoton.

Pri la kontribuoj ricevataj por la infana desegno-konkurso. Eblas jam vidi la ĝis nun ricevatajn desegnojn en la retpaĝo [www.esperanto-es.net/quijote/](http://www.esperanto-es.net/quijote/) (Malferma al la ĝenerala publiko).

HEF-Bulteno n-ro 370

\* Manero, Ana: Esperanto en la literaturo kaj la literaturo en esperanto. (Malferma al la ĝenerala publiko).

Ĝi konsistas el du partoj: citaĵoj el beletro, ĉefe hispanlingva, menciataj esperanton, kaj aro de elektitaj esperantaj libroj (inter kiuj pluraj tradukoj de la cervantesa verkaro), pruntitaj el la Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio. Oni inaŭguros ĉi ekspozicion du semajnojn antaŭ la kongreso, tiel ke ĝi povu esti libere alirebla de la loĝantaro de Alcalá de Henares.

\* Libro-servo.

## Kursoj kaj atelieroj

Gutiérrez Adúriz, Miguel: Traduk-ateliero.

Hernández, Pedro: Kurso: Enkonduko en esperanton.

## Kunsidoj

Estrarkunsido

Ĝenerala Kunsido de HEF-anoj

Kunsidoj de aliaj grupoj



donkiĥoto parolas  
esperanton

## 64a Hispana Esperanto-Kongreso

Alcalá de Henares (Madrid)

7a ĝis 10a de julio 2005

Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca  
Plaza San Julián n° 1

ALIĜILO N-RO.....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj .....  
 Antaŭnomo: .....  
 Naskiĝdato <sup>(1)</sup> ..... HEF-numero .....  
 Adreso .....  
 ..... Poŝtkodo .....  
 Urbo ..... Telefono .....  
 Retadreso ..... Faksilo .....  
 (2) Nur por statistiko  
 Kongreskotizoj ..... ĝis 05-05-31.. poste

Membro de HEF .....	30 € .....	39 €
NE membro de HEF .....	36 € .....	45 €
Juna membro de HEF .....	21 € .....	27 €
Juna NE membro de HEF .....	27 € .....	33 €
Donaco .....		_____
ENTUTE: .....		_____

Kotizu pere de UEA, konto "hefb-m", aŭ pere de ajna oficejo de BBVA,  
 al Federaci6n Espa1ola de Esperanto konto-numero:  
 0182-1252-33-0201517592.

Kunsendu la pagpruvilon kune kun ĉi aliĝilon al la suba adreso.

**Oni ne akceptos pagojn per bankĉeko aŭ poŝtmandato**

LA KOTIZO ESTAS NE REPAGEBLA.

Dato kaj subskribo .....

Konstanta adreso: Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7; ES-28015 Madrid;  
 Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79; Rete: admin@esperanto-es.net





Jen la grandformata diplomo, kiun ricevos ĉiu infano partopreninta en la internacia desegno-konkurso lanĉita de Hispana Esperanto-Federacio. Kompreneble, sur la nun malplena spaco, super la nigra linio, aperos la nomo de la koncerna infano.

La kongres-afiŝo kaj la diplomo estis dezejnita de s-ro Cristóbal Aparicio Barragán, kiu desegnis la figuron de Donkiĥoto kaj muntis poste la tuton.



Jorge Camacho kaj Huang Hsiu-Chen geedziĝis pasintan februaron en Taivano. La E-verkisto ĉeestis la Hispanan Kongreson.

